rekte al la ĉefa strio | rekte al la flanka strio

# Tatoeba-projekta blogo

Tatoeba estas projekto celanta kolekti multajn frazojn tradukitajn en diversajn lingvojn.

En ĉi tiu blogo vi trovos interalie novaĵojn kaj dokumentaron pri ĝi.

Lundon, la 24an de majo, 2010

# Moderigantoj en Tatoeba

Ĉi tio estas gvidileto kun oftaj demandoj por klarigi, kio estas la rolo de moderiganto ĉe Tatoeba, kaj por certigi, ke moderigantoj prudente uzu sian povon.

## Kial ni bezonas moderigantojn?

Ĉiu komunumo bezonas siajn moderigantojn, sed pli specife Tatoeba, la problemo estas tio, ke se vi ne estas administranto, vi (aktuale) ne povas :

- forig frazojn, eĉ ne viajn proprajn frazojn
- redakt frazojn, kiuj ne aparten al vi

Do pro la kresko de la komunumon, ĉiam pli da frazoj eniras la atendovicojn "forigu min" kaj "korektu mi" (pro membroj, kiuj neniam revenas por korekti siajn frazojn).

Moderigantoj estas ĉi tie por helpi zorgi pri tiuj frazoj, kiujn neniu alia povas prizorgi.

## Kion moderigantoj povas fari?

Moderiganto povas aktuale forigi, redakti, ligi/malligi (0)ajnan (/0)frazon. Jes, tio estas multe da povo, sed ĉar kontribuaĵoj estas registritaj kaj videblas por ĉiu, ne necesas tro maltrankviliĝi pri moderiganto fuŝunta kaj ruinigunta malpropran laboron.

Memoru, ke la moderigantaj rajtoj ankoraŭ ne "stabilas". Ni ekvilibrigos la permesojn post iom da tempo. Intertempe, ni ne vere havas tempon, tial ni fidos moderigantojn por fari la ĝustajn aferojn.

## Kiam moderiganto editu aŭ forigu?

Uzu vian moderigantajn rajtojn nur kiel la **lastan rimedon**.

Tiu precipe veras dum pritraktado de malpropraj frazoj. Iuj ĝoje lasos vin redakti aŭ forigi

iliajn frazoj sen sciigo pri tio (ili eĉ povus esti ĝenataj pro ĉi tio). Sed aliaj personoj povus senti, ke vi fiuzas vian povon, ne respektante ilia laboron, ne agnoskanta ilian ĉeeston en la projekto, aŭ simile.

Por eviti ĉian konflikton, redaktu nur frazojn, kie la lasta korektopeto diras "antaŭ du semajnoj" (aŭ pli) kaj neniu korekto estas farita. Forigu frazon nur post demando al la posedantoj, ĉu ili konsentas, ke ilia kontribuaĵo estas forigata.

Resume, donu al la publiko la tempon fari unua sian taskon, kaj eku **nur** se ili faras nenion.

## Kiel vi iĝas moderiganto?

Vi povas aŭ peti Trang-on aŭ atendi, ke ŝi konstatas, ke vi estas taŭga kandidato por iĝi moderiganto. Kriterio estas, ke vi estu almenaŭ "fidinda uzanto". La cetero estas subjektiva.

Poŝtita de Trang at 5:16 PTM

Labeloj: dokumentaro, eo

0 komentoj:

Poŝti komenton

Pli nova poŝto Pli malnova Al ĉefpaĝo

Aliĝi al: Poŝti komenton (Atom)

---

## Ligiloj

- Tatoeba Projekto
- Tanaka tekstaro
- Shtooka

## Etikedoj

- e (34)
- novaĵoj (23)
- romaĵia (4)
- dokumentaro (3)
- ideoj (3)
- validi (3)
- fr (2)
- pri (1)
- ar (1)
- aŭde (1)
- es (1)
- ĉefaj punktoj (1)
- japana (1)
- japona (1)
- kakasi (1)

- lingvolernado (1)
- serĉmaŝino (1)
- pensoj (1)

---

## Bloga Arĥivo

- October (1)
- la 2an de septembro
- Aŭgusto (4)
- Julio (1)
- Junio (2)
- Majo (6)
- Aprilo (6)
- Marto (3)
- Februaro (2)
- "'22 decembro.
- Novembro (2)

- Julio (1)
- Aprilo (1)
- Februaro (4)
- Januaro (8)